



# Eventoj

Redakcia adreso:  
Budapest, pk. 87.  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj telefakso:  
(+36-1) 1288-258

Internacia sendependa gazeto pri la esperanto-movado

1/novembro - '93

## Karaj legantoj,

proksimiĝas la fino de la jaro, kaj samtempe fino de la jara abonperiodo.

Tiu ĉi jaro estis la dua en la vivo de EVENTOJ, kaj estis plena de eventoj - almenaŭ por ni. Printempe ni kompilis la adresaron de E-gazetaro, kiun ni intencas ripeti ankaŭ sekvajare. Somere kiel speciala suplemento ni aperigis la unuan numeron de nova bulteno "Periodaĵoj", kiu ekde tiam daŭre estas kompostata ĉe ni. Partoprenantoj de IJK povis ĝui la donackuponon, aperinta en la 2/februara numero, kaj ni disponigas senpage e-literaĵojn por komputiloj al niaj abonantoj.

Kiel multaj rimarkis laŭ la stilo de artikoloj, ekde printempo la redaktan laboron partoprenas ankaŭ Nikolao Gudskov el Rusio.

Ni esperas, ke Vi estas kontenta pri la akurateco de la gazeto. Dum la tuta jaro ĝi aperis akurate, eĉ aperis ankaŭ somere, kio ja ne estas vasta kutimo en nia movado. Ni klopodis utiligi la dusemajnan aperitmon por freŝe informi pri aktualaj temoj. (Dum la IJK ekz. la partoprenantoj jam povis legi la aperintan numeron pri UKI)


Ni esperas, ke vi estas kontenta ankaŭ pri la enhavo de la gazeto, kaj ni invitas vin renovigi vian abonon ankaŭ por 1994. Aldone vi trovas la abonilon. Malgraŭ tio, ke niaj elspezoj kreskis je ĉ. 35 procentoj, la kresko de abonprezo estas multe malpli. Ni esperas, ke kresko de abonnumero rekompencos tiun perdon. En tiu afero ni petas ankaŭ vian helpon.

Se vi estas kontenta pri la gazeto, ni petas vin, helpu en la varbado de novaj abonantoj. Ju pli multe da legantoj, des pli utilas la aperintaj artikoloj kaj viaj anoncoj. Multe ni klopodas helpi la praktikan kaj fakan aplikadon de esperanto, sed necesas, ke tiuj informoj atingu kiel eble pli da homoj. Varbu inter viaj samklubanoj, konatoj, abonigu la kursanojn - kaj vi povas varbi ankaŭ en diversaj renkontiĝoj. Se vi petas por tiu celo, volonte ni sendas stoketon de varbekzempleroj kaj aboniloj.

Je la unua vido la abonprezo povas ŝajni multa. Sed se vi logike pripensas, la tabelo sur la oka paĝo montras, ke EVENTOJ estas eble la relative plej malmultekosta internacia E-periodaĵo (por taksu ajnan abonprezon indas subtrahi la sendokoston...). En Hungario unu numero de la gazeto samvaloras kiel 2 tram-biletoj. Ĉu eblas produkti dusemajnan gazeton malplikeste?

Nek nia movado, nek nia gazeto povas atendi eksterajn miraklojn kaj subtenon. Ni povas kalkuli nur pri si mem, nur pri nia komuna ago. Ankaŭ en la estonto ni laboros en tiu spirito.

Kun salutoj via redaktoro



Szilvási László

## AGO-TAGO TRA LA MONDO

### Turku, Finnlando

Du lokaj gazetoj kaj kvar radistacioj anoncis anticipe pri nia esperanto-informejo en la urbocentro.



Tri horojn ni aktive allogis publikon proksimiĝi al nia ekspozicia tablo. Evidentiĝis, ke esperanto al multaj homoj ankorau estas nekonata fenomeno. Kelkaj el ili eĉ ne kuraĝis akcepti niajn prospektojn kvazaŭ timante iun infektiĝon! Feliĉe, tamen, multaj scivolemaj gejunuloj vizitis nian standon kaj konatiĝis kun revuoj, libroj, muzikkasedoj ktp.

El la plej proksima radistacio venis raportisto intervui la aranĝantojn en rekta disaŭdigo. Certe, la programero iom klarigis signifon de la internacia lingvo kaj, espereble, vekis ies intereson ankaŭ lerni, sed ni devas disdoni pli da informoj pere de amaskomunikiloj por fari esperanton konata kaj - antaŭ ĉio - dezirata.

Kvankam por nia informado en Turku nek la tempo nek la loko estis la plejble taŭgaj, ni entute povas esti kontentaj pro ricevita atento.

Anna-Liiza Ali-Simola

### Adelajdo, Aŭstralio

Ne estante multnombraj kaj ne havante longan prepar-tempon, la esperantistaro en Adelajdo decidis por Ago-Tago 1993 ne okazigi surstratan manifestacion, sed (kiel ofte antaŭe) serĉi partoprenon en jam planitaj eventoj sufiĉe videblaj.

La centra elektita evento en Adelajdo estis la unua landa konferenco de la Aŭstrialia Asocio pri Lingvistiko, kies jam anoncita temo estis "Lingvo por Internacia Komunikado". S-ro Bill Menary,

(daŭrigo sur la p. 2)

### Triesto, Italio

Triesta Esperanto-Asocio decidis partopreni la iniciaton pri la publika propagando, per starigo de surstrata ekspozicio kaj disdonado de inform-materialoj. La afero okazis sub arkadoj de urbocentra strato.

Oni disdonis pli ol 2.000 flugfoliojn kun informoj pri la movado, okazigo de la venontaj kursoj, ktp. Dum deko da horoj aro da klubanoj klopodis atentigi preterpasantan civitanaron pri la problemoj de internacia interkomunikado kaj pri la solvo "esperanto".

Por la triestaj aktivuloj estis interesa sperto tiu rekta kontakto kun la ekstera publiko.

Pro la konstanta propagando de TEA (oni klopodas ĉiumonate aperigi ion pri esperanto en la du triestaj taggazetoj) triestanoj ja konas la ekziston de nia helplingvo, sed vere malmultaj pri ties ecoj kaj aplikobloj. Evidentiĝis, ke la ĝis nun farita propagandado lasis nesufiĉajn spurojn.

Ĝuste pro tio estas ĝenerala impresio, ke eliri el nia kutime fermita nesto estas konsilenda kaj sugestenda al ĉiuj aliaj esperanto-grupoj.

Elda Doerfler

### Tuluzo, Francio

Kiel lastjare, en Tuluzo la esperantistoj respondis al la alvoko de Esperanto-Kultur-Centro, kiu preparis tiun tagon helpe de la diversaj esperanto-asocioj de Tuluzo kaj la regiono.



Tiel ĉi partoprenis membroj de Esperanto-Haufe Garonne (UFE/UEA), Esperanto 31, SAT-Amikaro (SAT), Tuluzaj Esperanto-Fervojistoj, EUROKKA, (daŭrigo sur la paĝo2)

## Movada teorio

### Ĉu oni povas surmerkatigi esperanton?

Dum kvin tagoj oni pridiskutis tiun tikan temon en staĝo, kiu okazis somere en Francio, en la e-centro "Kvinpetalo". La ĝenerala temo estis: "Surmerkatigo de esperanto laŭ la modernaj teorioj de merkato".

#### Kiu devas informi pri esperanto

Al esperantistoj mankas entreprenemo. Se ni analizas, fakte, kiuj estas la esperantistoj, ni povas dividi ilin en tri kategoriojn: la orienteŭropanoj, vivintaj dum generacioj sen iu ebleco fariĝi entreprenistoj; en la okcidentaj landoj - instruistoj, do ŝtataj dungitoj; intelektuloj aŭ laboristoj, kies ĉefaj interesoj neniam estis konsideri la lingvon entrepreneme.

Sekve, tiuj esperantistoj ĉiam klopodas "vendi" esperanton kiel lingvon aŭ kiel filozofion/religion (la interna ideo, la frateco, la dua lingvo por ĉiuj, ktp.).

#### Kian esperanton vendi?

Tiu estis la plej grava parto al kiu pli da tempo estis dediĉita, kaj kiu kontentige donis al la staĝantoj la eblecon revizii kelkajn bazajn opiniojn.

Laŭ la moderna merkato lingvoj posedas du partojn: "hard"-an (firman aŭ malmolan) kaj "soft"-an (molan).

Firma estas la strukturo, la gramatiko; ĝia norma parto. Mola estas la valoroj de la lingvo, ekz. ĝia literaturo, kulturo, la sento de prestiĝo, la praktika utilo...

#### Kiujn firmajn kaj molajn valorojn havas esperanto?

Tradicia propagando insistas per kutimaj sloganoj, kaj pro tio distanciĝas de la moderna lingvomerkatado.

Esperanto estas forta lingvo kompare al la aliaj en sia firma parto, sed malpli forta ol, ekz., la angla laŭ sia mola parto (nome la avantaĝoj ekonomia, kariera, por persona prestiĝo ktp.).

Surmerkatigi esperanton estas ĉefe tio: oni tendencas "vendi" ĝian firman parton (facilecon, rapidan lerneblon, belsonecon) sed ne kapablas vendi la molan, nome la

kulture pliriĉigajn valorojn. Ankaŭ ĉar, ofte, la tradicia propagandisto mem ne bone konas ĝin. Estas klare ke tiu mola parto ne konkeras amasojn; sed samtampe ĝi povas konkeri pli interesajn homojn, fari ilin pli celkonsciaj kaj reteni ilin en la lingvouzo. Tio signifas celi al kvalito antaŭ ol kvanto.

La enhavo de esperanto estas tero nekonnata por la varbato, sed ofte ankaŭ por la varbanto!

#### Kiel surmerkatigi esperanton laŭ ĝia "mola" parto?

Tio signifas analizi la produkton laŭ tio, kiel ĝi situas en la merkato, kian bildon ĝi havas, kian postvendan servon kapablas doni? Ĉu nur kluban vivon, UK-ojn, festivalojn, bultenojn, aŭ, kiel en la makrosocio, kulturajn servojn?

Per analizo de fortaj kaj malfortaj punktoj de nia lingvo evidentiĝas interesaj "merkataj niĉoj", la celgrupoj, al kiuj oni direktu siajn informajn klopodojn. Kuncerbumado (la tiel nomita "cerbo-sturmo" de la profesiaj reklamistoj) inter la staĝantoj starigis longan liston de nekutimaj fortaj punktoj, tre ofte forgesataj de informistoj.

Post analizo de la mola parto de esperanto la staĝantoj ekzercadis pri tio ne sufiĉe taksata aspekto (pli socia ol lingva), kaj sur tiu bazo oni verkis novtipajn mesaĝojn, celantajn al specifaj grupoj; la metodo, kiu, cetere, ŝparas monon kaj tempon.

Ankaŭ la analizo de konkurencio (ĉagreniga punkto) fariĝas, laŭ tiu ĉi vidpunkto, pli simpla, se ni akceptas rezigni disinformadon kaj preferas mesaĝi al selektitaj grupoj. Tiam ni jam de la komenco evitas sensukcese kontraŭbatali la ĉefan konkurencion, kiu estas "neniu intereso krom mono kaj kariero", aŭ "neniu kultura intereso". Tio konsciigu nin, ke esperanto ne taŭgas por konsumantaj amasoj, sed nur por elitoj, kvankam ne necese nombre limigitaj; ke kvalito multe pli gravas ol kvanto; ke nova pozitiva bildo por esperanto devas veni de esperantistoj mem, kiuj formu altnivelan klason, kiu povos pruvi al la makrosocio la verajn valorojn de tiu ne multnombra sed disa, unika mikrosocio.

Nome, ĉar ne plu eblas kaj eĉ ne interesas, almenaŭ dum venonta jardeko, ke esperanto fariĝu la "lingvo de flughavenoj", kiel Umberto Eco diris, restas nur unu alternativo: la Raŭma vojo.

Marco Picasso, Italio

## En Albanio

La 10-an de oktobro en ĉe-mara urbo Durres estraro de Albana Esperanto-Junularo aranĝis grandan tutnacion renkontiĝon. Gejunuloj-esperantistoj interŝanĝis sian ĝisnunan sperton kaj en konstrua debato pripaŝolis estontan plivigliĝon de la movado. Tiun eventon honorigis lokaj urbodomaj aŭtoritatoj kaj reprezentantoj de politikaj partioj. Pri ĝi anoncis ankaŭ amaskomunikiloj.

Bardhil Merimi

## Ago-Tago en Tuluzo

(daŭrigo; komenco sur la paĝo 1)  
Esperanto Ariège, Esperanto Tarn-et-Garonne, Esperanto-Verdujoj.

Entute estis dudeko da esperantistoj, do malpli ol lastjare. Bedaŭrinde la malfrua anonco de la Ago-Tago kaj la veteraĉo ne helpis venigi homojn.

Tamen, la agado ne estis manifestacio, kiel pasintjare. Je la 14-a horo ni rendezuis sur la ĉefplaco Capitole, antaŭ la urbodomo, kaj tie ni unu-, du- kaj triopliĝis sur la placo, en apudaj stratetoj, kaj ĉe la metro-enirejo, por pleni enketilon pri esperanto kaj la lingvo-problemo al preterpasantoj. Samtempe, la fervojistoj prezentis ekspozicion kaj enketis en la stacidomo Matabiau.

Estis bonega kontakto kun la sonditoj! Respondis proksimume 200 personoj. La rezulto estis signifa kaj pozitiva. Pli ol duono (68 %) da ili ne sciis, kio estas esperanto, kaj ĉirkaŭ 50 personoj donis sian adreson por ricevi informojn kaj eventuale lerni la lingvon - esperanton, ne la anglan!

Je la 17-a horo ĉiuj regrupiĝis antaŭ la urba domo kun flagrubandoj kun surskribo "Esperanto" kaj "Pour défendre nos langues: l'esperanto" ("Por defendi niajn lingvojn: esperanto").

Esperanto-Kultur-Centro invitis la ĵurnalistojn renkonti nin tie, sed venis nur fotisto de la plej grava gazeto de la regiono (La Dépêche du Midi). Ĝis nun nenio aperis, eĉ ne la teksto kiun ni pretiĝis surloke.

Tamen, la antaŭan tagon TLT (Televido de Tuluzo) dissendis 7-minutan programeton pri esperanto kun Jomo, la kantisto de la *Rozmariaj Bejoj* (esperanta rokbando) anoncanta Ago-Tagon. Ĝi estis anoncita ankaŭ en la priesperanta programo de Radio FMR.

Esperanto-Kultur-Centro,  
1 rue Jean Aillet, F-31000 Toulouse, Francio

## Ago-Tago en Adelajdo

(daŭrigo; komenco sur la paĝo 1)

esperantisto kaj lekciisto pri la skota kaj skandinava lingvoj en la Universitato de Adelajdo, sukcesis enmeti en la programon de tiu konferenco forumon pri esperanto. Kompreneble, oni devis sendi komunikojn al la ĉiusemajna gazeto de la unuversitato kaj al la publika gazetaro.

Krom mencioj en novaĵ-bultenoj, oni ricevis du radio-intervjuojn.

Estis granda priesperanta ekspozicio apud la forumo-salono, kaj gastprelegis Kep Ennderby, Prezidanto de la Aŭstralia E-Asocio, eksministro de la aŭstralia registaro kaj antaŭa juĝisto en la regiona alta kortumo. La lingvistoj bone reagis, la demandoj kaj komentoj estis inteligentaj, sen kutimaj stultaj antaŭjuĝoj pri la lingvo.

La esperantistoj en Adelajdo alte taksas

la ideon de tutmonda Ago-Tago. Ĝi povas fariĝi la plej granda ĉiujara tradicio de la e-komunumo. Oni jam celebras en ĉiu lando la naskiĝdatrevenon de Zamenhof en klubejoj. Estas eĉ pli grave, se oni povos celebri la naskiĝdatrevenon de "Lingvo Internacia" en la "ĉefvojoj" de la mondo la 26-an de julio. Ĉar tiu dato kutime okazas dum UK, ĝia celebrado povus fariĝi parto de informado pri tiu grandioza evento.


Max Wearing

## Faka aplikado

### Homeopatoj uzas esperanton

Homeopatio, aŭ homeoterapio, estas medikamenta kuracmetodo, bazita sur la "leĝo de simileco": se grandaj dozoj de iu substanco elvokas certajn patologiajn simptomojn, malgrandaj dozoj de tiu substanco povas kuraci malsanojn, kiuj havas similajn patologiajn simptomojn (ekz., kinino en granda kvanto elvokas febron, similan al tiu dum malario, sed en malgranda kvanto ĝi efike kuracas malarion). Kuracistoj-homeopatoj praktikas kaj faras esplorkomunikaĵojn en multaj landoj tra la tuta mondo.

Brazilia  
Instituto  
de Homeo-  
opatio  
Francois  
Lamasson



(IHFL), ekzistanta pli ol 10 jarojn, en 1992 starigis esperanto-departamenton, kiu komencis e-kurson por instruistoj kaj lernantoj de la instituto. Krome, la faka revuo, eldonata de la instituto, *Homeopatia esplorado*, nun iĝis dulingva - portugala kaj esperanta. La Muzeo de Homeopatio Abrahamo Brickmann, funkcia ĉe la instituto, eldonis tre interesan scienc-popularan libron pri la fako "*Homeopatio. Populara orientado*" de Izaio Carniero Soares ankaŭ en la du lingvoj.

Specialistoj de la instituto kun aliaj esperantistoj-homeopatoj, partoprenintaj en la 54-a Tutamerika Medicina Kongreso de Homeopatio, akceptis rezolucion por apliko de esperanto kiel la laborlingvon por la sekvontaj kongresoj. En sia agado ili sekvas la sloganon: "*Homeopatio = ekvilibro de sano. Esperanto = ekvilibro de komunikado*".

N.G.

Pri la menciitaj eldonaĵoj kaj aktivecoj pli detale interesiĝu ĉe:

*IHFL, Rua Américo brasileiro, 1418, CEP 14015-050, Rjbejrao Preto-SP, Brazil*

### Esperanto en du interlingvistikaj konferencoj

Kadre de la 24-a konferenco de la germana "Societo pri Aplikata Lingvistiko", de la 23-a ĝis 25-a de septembro 1993 en Leipzig, du interlingvistoj traktis ankaŭ esperanton. D-rino Sabine Fiedler (anglistino en la universitato de Leipzig) komparis lingvistikajn faktekstojn en la angla, germana kaj esperanto. D-ro Detlev Blanke (Berlin) parolis pri "Faka komunikado en planlingvoj".

Kadre de scienca konferenco pri "Lingva situacio kaj lingva kulturo en internacia komparo - aktualaj lingvaj problemoj en Eŭropo", kiun okazigis la berlina "Societo por progresigo de lingvistikaj studoj" de la 21-a ĝis la 23-a de oktobro en Berlin, D. Blanke prelegis pri "Sociolingvistikaj aspektoj de esperanto". Ĉiuj prelegoj estis kun intereso akceptitaj kaj sekvigis aferecan diskuton.

*Detlev Blanke, Germanio*

### Interlingvistika instruado en Bulgario

Ekde 1992 en la Ŝtata Pedagogia Instituto de Vraca, kiu preparas instruistojn, ekzistas ankaŭ la fako Interlingvistiko. Studentoj povas elekti interlingvistikon kiel duan fakon, apud la ĉefa. La interlingvistika studado daŭras 4 semestrojn. Temas entute pri 330 studhoroj kaj 6 studobjektoj: enkonduko al interlingvistiko; fundamento de la lingvo esperanto; sociaj aspektoj de esperanto; esperanta literaturo; metodiko de esperanto-instruado; informadikaj aspektoj de esperanto.

El la listo de la studobjektoj videbliĝas, ke la kurso estas malpli interlingvistika ol esperantologia.

La Pedagogia Instituto aliĝis al Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino kaj organizas ankaŭ diversajn kursojn, krome korespondajn kaj praktikajn seminariojn. Oni okazigis ankaŭ internaciajn seminariojn de ILEI/UEA. Prepariĝas instruhelpiloj. La lektoroj, kiuj instruas pri interlingvistiko kaj esperantologio, estas d-ro Emil Pavlov, d-ro Kiril Velkov, prof. Kiril Popov, Ljubomir Trifončovski, Sneĵana Angelova, Venelin Mitev, Dobrinka Zagorova.

La kontaktadreso:

*L. Trifončovski, str. Al-Stambolijski 17, ap. 11, BG-3000 Vraca, Bulgario. el "Informilo por interlingvistoj, n-ro 4 (1/1993)*

### Japanaj STS-interesantoj volas komunikiĝi kun alilandanoj!

Ni komencas novan eksperimenton por komunikiĝi kun alilandanoj pri nia temo STS per esperanto. Ni ne scias, kiom da tempo tiu ĉi eksperimento daŭros. Ĉio dependas de la intereso de alilandanoj.

Niaj temoj estas: scienco, tekniko, socio, kaj alie: ekologio, medio, evoluigo, politiko, ekonomio, etiko, eduko, kulturo, vivo, liberigo, demokratio...

Tiuj ĉi temoj havas interrilatojn, kaj konsistigas unu grandan kampon. Oni nomas ĝin STS.

STS estas mallongigo de Scienco-Tekniko-Socio (originale angle: Science-Technology-Society). Nuntempe gravaj problemoj enlandaj kaj mondaj rilatas iusence al scienco kaj/aŭ tekniko. Tial nun pli gravas tiu studkampoj STS.

En Japanio en marto 1989 aperis Japana STS-Reto (angle: STS Network Japan), organizo por enretigo de homoj interesataj pri la temo Scienco-Tekniko-Socio. La membroj konsistas el universitataj kaj altlernejaj instruistoj, universitataj studentoj, sciencaj ĵurnalistoj, registaraj kaj kompaniaj esploristoj pri scienco kaj tekniko, k.a. La membraro nombras ĉ. 100. La Reto organizas simpoziojn pri STS-temoj, kunsidojn por STS-esplorado kaj -instruado, publikigas novaĵleterojn kaj planas publikigi STS-temajn librojn. Ni komunikas ne nur per skribaĵoj kaj rekta parolado, sed ankaŭ per komputila reto, per kiu ni povas interŝanĝi informojn kaj diskuti pri diversaj STS-temoj facile kaj rapide.

Nia agado ĝis nun estas limigita enlande. Komprenoble ni volas komunikiĝi kun alilandanoj. Estas signo de tio, ke la nomo de nia organizo estas anglalingva. Tamen, komuniki en la angla estas tre malfacile por la japanoj, eĉ plej edukitaj. Kiam ni parolas kaj skribas angle, ni sentas ke ni fariĝas infanoj. Ni volas komunikiĝi kun alilandanoj lingve egale. Esperanto povas esti ilo por bonigi nian situacion.

Ni lanĉas *Novajletonon* en esperanto, kiu estas resumo de la originala *Newsletter*, skribita japane, malgraŭ sia angla titolo. Respondoj al ĝi povos sukcesigi la tutan projekton, kaj helpas krei signifan esperantistan grupon de la Reto. Skribu kaj respondu!

*TAKAKA Hiroaki  
el "Novajletero" n-ro 1, nov. 1992*

Kontaktadreso:

*2-26-15-103 Kashii, Higashi-ku,  
Fukuoka 813, Japanio*

### Por koni bazajn terminojn

Komputika scienco kaj tekniko evoluas tre rapide, tial aperas novaj terminoj, scii kiujn necesas por la komputiluzantoj. Tamen multaj bazaj nocioj kaj terminoj restas en komputiko, kiel en ĉiu fako, senŝanĝaj dum jardekoj. Pro tio oni povas rekomendi "Komputadan Bazan Terminaron", kiun kompilis Gerard Kalckhoff kaj Anthony C. Pick en kunlaboro kun inĝ. Auguste Broise. Eldonita en 1985, sed ĉefe aran-

ĝita jardekon pli frue, ĝi ne enhavas terminojn pri la modernaj personaj komputiloj, sed bone donas esperantlingvajn difinojn por 369 bazaj terminoj kun tradukoj al la angla, germana kaj franca (en la lingvoj estas ankaŭ apartaj alfabetaj indeksoj). La 52-paĝa libreto haveblas ĉe:

*Wolfram Diestel,  
Baubereinstr. 3,*

*D-04416 Markkleeberg, Germanio.*

**Grafik-centro «+Kvar»**  
ofertas ĉiujn specojn  
de aplika grafikarto  
proektado de grafikaj  
reklamajoj  
grafikaj servoj por  
poligrafio  
disvastigo  
de reklamo  
ukrainio. 335057 u.s.b.001.0010.13  
p/k 168 1.01.(0490) 246803 364413

## Aranĝoj

### La 10-a Internacia Festivalo

Ĝi prezentos specialan programon por "la dua generacio" de esperantistoj, t.e. 25 - 55-jaruloj, kaj al junaj e-familioj (ĉu kun, ĉu sen infanoj).

Ĝi okazos 27.12.1993 - 03.01.1994 en Senstein, Germanio (do, samtempe, sed ne samloke kun la junulara aranĝo IS).

La kadra temo estas *la Esperanta literaturo*, okazos prelegoj kaj diskutrondoj, kaj ankaŭ, certe, distra programo. La loĝkondiĉoj estas tre oportunaj, estos senpaga naĝejo, saŭno, gimnastikejo.

La plena kotizo, depende de la aĝo kaj aliĝdato, de 160 ĝis 430 DEM. Por nepagipovaj landoj specialaj kondiĉoj.

Pliajn informojn kaj aliĝilojn petu ĉe:

Hans-Dieter Platz, P.k. 1148,  
D-34303 Niedenstein, Germanio.

## PSI 10-jara!

La Printempa Semajno Internacia (PSI) de Germana Esperanto-Asocio festos sian 10-jaran jubileon en la urbo Junkeroto (apud la landlimo de Belgio kaj Luksemburgio) de la 1-a ĝis la 9-a de aprilo 1994.

PSI estas aranĝo por familioj, sed ne nur - ankaŭ unuopuloj estas bonvenaj.

Ĝi estas aranĝo por turismemuloj, sed oni ankaŭ prelegas, diskutas, lernas, ludas, okupiĝas pri manlaboroj.

Pliajn informojn kaj aliĝilojn petu ĉe:

PSI, Wolfgang Bohr, J. Kirschweg Str. 11,  
D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler,  
Germanio.

Tel. +49-02641-4885;  
fakso +49-02641-4014.

## 15-a Novjara Junulara Renkontiĝo

"La plej granda regado en la mondo estas regado super si mem" diris Leonardo da Vinci, kaj tiu moto iĝis la temo de la renkontiĝo, kiu okazos de la 28.12.1993 ĝis la 02.01.1994 en montara kuraĉloko Polanica Zdrój (100 km sude de Wrocław), Polio.

Dum la aranĝo estos pritemaj prelegoj kaj diskutoj, esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, ekskursoj, diskotekoj, koncertoj, ludoj kaj - la ĉefa - Granda Novjara Maskobalo kun konkurso pri la plej originala kostumo.


La partopreno kostos de 180 ĝis 220 DEM, depende de la lando kaj aliĝdato.

Pliajn informojn ĉe:

Silezia E-Asocio, ul. Dubois 3, skr. poczt. 16,  
PL-50-992 Wrocław 17, Polio;  
tel./fakso +48-71-226954

## Esperante interreligie - ĉu trovi homaranismon?

Kiel eduki al toleremo, kiel forgesigi la rasajn, klasajn, naciajn ktp. diferencojn kaj prioritati la interligan komunon? Kaj ĉu ne ĝuste la religio devas montri la vojon? Ĉu ne la interreligiaj tensioj kaj konfliktoj estas unu el la plej plorigaj ĉapitroj de la homara historio?



Jen la centraj demandoj pri kiuj temoj la unua *Interreligia Seminario Esperantista* (ISE), Tabor/Ĉehio 31.03 - 04.04.1994 (pasko).

Tiuj demandoj certe sonas konate al multaj esperantistaj oreloj. Ĉu ne ĝuste ili naskis la zamenhofajn hilelismojn, homaranismon, la alvokon al la diplomatoj ("Post la granda milito") kaj, kompreneble, la lingvon internacian mem? Kiom do prosperis la zamenhofaj solvoproponoj kaj ĉu ili restis - ĉu entute ili iam estis - aktualaj kaj realismaj?


La seminario estas organizata de ASISTI (Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj), la juna interreligia e-asocio.

Informilo kaj aliĝilo ĉe:

Bernhard Westerhoff,  
pk. 500133, D-60391 Frankfurt,  
Germanio

## Ripozi en Kecskemét

La ŝatantoj ripozi en kamparo povas fari tion en la regiono de la hungara urbo Kecskemét. La pli ol 600-jara urbo konservis sian fizionomion, samtempe estas tute moderna. La farmodomoj same prezentas ĉiujn oportunaĵojn en tradicia vilaĝa etoso. Ekzistas ebledo rajdi, ekskursi al proksimaj urbetoj, stepo kaj arbaro, gustumi bonan lokan vinon ktp.



En la regiono de Kecskemét ekzistas e-asocio kun ĉ. 100 membroj, kun ili eblas interkonsenti pri renkontiĝo(j).

Ekzistas vasta elekteleco de la farmodomoj kaj diversaj kondiĉoj. Pri la detaloj oni povas demandi ĉe:

Falusi-tanyai turizmus, Management Kft.,  
Palásti Ferencné, Horváth D. u. 14,  
H-6000 Kecskemét, Hungario;  
tel. +36-76-321908; fakso +36-76-481884.

## Kulturo

### Ne legi estas rajto!

En la ĉi-suba intervjuo la redaktoro de la revuo "Esperanto", István Ertl, intervjuas soci-psikologinon, Fabienne Berthelot.

- Vi estas soci-psikologino. Kion vi diagnozas en la esperanta komunumo: ĉu literaturo estas pli grava por nia identeca sento ol ĝi estas ĉe alilingvaj komunumoj?

- Jes, ĉar ĉe la esperantistoj multaj el la kurtimaj identec-eroj ne ekzistas: mankas ekzemple identiĝo kun iu teritorio, alprenado de iu vivmaniero, aŭ komunaj manĝkutimoj... Sed tre forte kunligas la komuna lingvo, kaj literaturo estas ĝuste ties grava manifestiĝo.

- Sekve, ni nomu nur tiun vera esperantisto, kiu legas esperantan literaturon?

- Tio estas absolute malĝusta! Tio estas elitismo kaj diskriminacio! Ĝuste tiu kiu asertus tion, estus, laŭ vera senso de "esperantismo", neesperantisto, pro tio ke la plej grava eco de esperantisto estas toleremo. Por mi, la "interna ideo" estas toleremo mem.

- Esperanto estas lingvo ankoraŭ plie skribata ol parolata. La esperanta kulturo konsistas 90-procente el libroj. Estas do nature atribui al ili grandan gravecon.

- Jes, oni honoru niajn bonajn verkistojn. Sed ne nur ilin! Estas centoj kaj miloj da tiel nomataj "simplaj esperantistoj" - certe ne pli "simplaj" ol multaj verkemuloj - kiuj kreas interhomajn kontaktojn, intense vivas sian esperantismon. Mi protestas kontraŭ la tiraneco de iuj beletremuloj, kiuj prenas en konsideron nur la verkantojn kaj, eventuale, la legantojn. Ne legi estas rajto! - Sed ne legi ankaŭ signifas maltrafi valorojn. Oni devas instigi la homojn legi en esperanto.

- Tamen, la bona maniero por tio ne estas deklari legadon iaspeca morala devo. Multaj jam forgesis sian komencantecon, kiam estis malfacile legi esperantan tekston. Fakte, krom por eta malplimulto, tio ĉiam restas malfacila. Almenaŭ pli malfacila ol legi en sia propra lingvo.

- Mi konscias, ke oni devas fari fortostreĉon por akiri la kapablon ĝue legi en esperanto, sed tio ja valoras la penon.

- Konsentite. Ankaŭ mi havis tiajn legoplezurojn ke mi forgesis, en kiu lingvo mi legas: ekzemple ĉe la romano *Ombro sur interna pejzaĝo* de Spomenka Štimatec aŭ ĉe la aŭtobiografiaj *Aventuroj de pioniro* de Edmond Privat. Interese verkita historio povas instigi kiun ajn al legado, kaj tiel al la lingva perfektigo.

- Do ni popularigu legadon per interesaj historioj ekde la eklerno, ĉu? Tiel okazas kiam oni uzas la rakonton "Gerda malaperis"...

- Por la popularigo de literaturo oni ankaŭ aranĝu dum la esperanto-renkontiĝoj malstreĉajn babiladojn kun kaj pri verkistoj. Eĉ nelegantoj venos tien se la temoj tuŝas ilin. Tiel mi spertis ekz. en la IS de 1990/91, kiam oni diskutis en plenplena salono pri la libro *Fajron sentas mi interne* de Ulrich Matthias.

Kaj, anstataŭ ripetadi ke legado estas grava por la esperantista movado, oni apliku la metodojn de moderna merkato!

el "TEJO tutmonde", n-ro 4/1993 (mallongigita)

## Movado

### Kontraŭrasisma iniciato en Berlin

Rasismaj eldiroj kaj faroj ekzistas en multaj landoj. Ili ofendas homajn rajtojn de la akitoj. Rasismo povas penetri la socion je diversaj niveloj.

Esperantistoj premias, ke ili estimas ĉiujn homojn kaj ne diskriminacias. Kiugrade tio ĝustas? Ne mankas diversformaj kontraŭagoj al rasismo.

En la seminario, kiu okazos de la 21-a ĝis 23-a de januaro '94, ni atendas esperantistojn, kiuj pretas memsperte percepti proprajn rasismajn kondutojn. La celo estas pli sentigi kaj pensigi pri kaŝita rasismo kaj proponi kontraŭagojn.

La seminario estos senprelega. La partoprenantoj laboros en pleno, grupetoj kaj duopoj. La seminaria koncepto orientiĝas laŭ metodo de la kontraŭrasisma trejnistino kaj aŭtorino Lida van den Broek. Grava elemento estas la serĉo pri propra sperto de diskriminacio. Gvidos profesiaj kontraŭrasismaj klerigantoj de la internacia klerigejo *Časkastele Glienicke* en Berlino.

15 partoprenantoj povos ĉeesti la tritagan seminarion en Glienicke. La unua seminario estos en la germana lingvo, sekvaj estos en esperanto. Ĝi estas destinita unuagrade por homoj kun ligo al la temo, ĉu pere de ilia profesio, ĉu alimaniere.

Pliajn informojn petu ĉe:

Elizabeth Schwarzer, Kaiserin-Auguste-Str. 75,  
D-12103 Berlin, Germanio.

## Afrika agado

### Laborejeto pri kudrado

En Bujumbura, Burundio, en aprilo 1993 laŭ iniciato de Kikulu Mukeba Bertin estis fondita laborejeto pri kudrado, kiu funkcias kune kun esperanta klubo, ĉar la klubo volas doni al la klubanoj vivintereson.

La celo de la iniciato estas, unue, disvastigi la uzadon de esperanto al la georfoj kaj, due, metilernigi al ili la kudrometion, kiu permezas al ili vivi en ĉi tiu mondo kaj en esperantista mondo. La laborejeto celas interŝanĝi laboraĵojn kun aliaj laborejoj, komerci siajn laboraĵojn tra la esperantista mondo kaj al neesperantistoj, kunlabori kun ĉiuj dezirantoj, havi kiel klientojn por siaj laboraĵoj ĉefe esperantistojn.

Estus bele, se spertuloj pri kudrado en la tuta mondo kontaktus niajn amikojn en Burundio. Ne nur por ke ili trovu klientojn (povas esti praktikaj malhelpoj), sed precipe por interŝanĝi spertojn, sciojn, ideojn. La klubanoj volas lerni pli pri kudrado, pri esperanto. Aliflanke, de ili oni povas lerni pri afrika vestado, k.s. Korespondado povas esti interesa reciproke! Do, la kontaktdresado:

Kikulu Mukeba Bertin, B.P. 4083 Ngagara,  
Bujumbura, Burundio.  
laŭ informo de H. Bakker

### PASPORTA SERVO: faktoj, faktoj kaj faktoj pri niaj gastigantoj

Ĝus aperis la tioma eldono de la sukcesa *Pasporta Servo*. Laŭ la enkonduko ĝi jam ekzistis en 1966, sed daŭris ĝis 1974, kiam aperis la nuna sistemo "Pasporta Servo".


Jam delonge mi estas scivolema pri kiun (nova) gasto povas antaŭvidi dum vojaĝo. Pro tio mi faris statistikan esploron pri la listigitaj gastigantoj. Jen la rezultoj:

En PS troveblas 1116 personoj en 813 adresoj, inter kiuj 1087 viroj, 457 virinoj kaj eĉ 148 senseksaj homoj (!). La adresoj situas en 72 landoj kaj 615 urboj/lokoj. Tio signifas, ke ĉiu PS-lando averaĝe havas 8,5 urbojn kun gastiganto(j).

El 813 adresoj 695 atingeblas per telefono, telefakso, e-poŝto, radio, telekso aŭ kombino de la supre menciitaj komunikiloj. Strange estas ke 690 homoj (legu: adresoj) mencias telefonnumerojn, kvankam nur 466 deziras telefonan peton!

Mi ankaŭ kalkulis la averaĝan naskiĝjaron de ĉiuj gastigantoj en PS, nome 1953. Sed se oni taksas, ke naskiĝtagoj estas egale disdivagitaj dum la jaro, tiam la "averaĝa" naskiĝtago estas la 15-a de decembro. Do ni povas konkludi, ke la meza PS-gastiganto estas vera esperantisto!

Krome kalkuleblas kiom da tagoj vojaĝema PS-uzanto povas esti for de la hejmo sen renkontiĝi kun sama gastiganto. Mi montras tion en la sekva grafikaĵo:



Vi legu ĝin jene: grupo el dek personoj povas vojaĝi dum 111 tagoj. Kaj por unuopa homo eblas vojaĝi dum 4719 tagoj tra la mondo, do pli ol 12 jarojn!

Sed tiam ne plu validos tiu ĉi nova PS.

Entute la gastigantaro "disponas" pri 13.053 gastonoktoj.

Do, kun tiuj ĉi informoj mi deziras al vi bonan vojaĝon, kaj ĝis la reveno de

N. Enurmi

P.S. PS haveblas ĉe UEA (*Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando*) kaj ĉe la landaj sekcioj de TEJO.

el "Koncize", 5/1993

## Reagoj

### Oni bezonas fakvortarojn!

Nikolao Gudskov (*Eventoj*, 1/oktobro 1993) alvokas, ke "ni ne disipu la fortojn kreante al neniun bezonatajn fakvortarojn, sed disvastigu nian lingvon por ĝia plej rekta kaj aktuala destino: amik(ig)a interkomunikado!"

Tio estas starigo de falsa prioritato, ĉar ankaŭ kreo de fakvortaroj servas por "amik(ig)a interkomunikado". Kiam "fakgrupo decidas apliki esperanton" (tiaj decidoj ja foje estas deklarataj: de verduloj, homeopatiistoj ktp.), malmulto okazas rekte pro tiu decido; en kiu ajn fako pli gravas la realaj komunik-bezonoj de la fakuloj lernintaj la lingvon. Kiam tiuj, "disipante siajn fortojn", ellaboras fakvortarojn, tio okazas ĉar ili "amik(ig)e interkomunikis" ne nur pri vorto kaj cetero, sed ankaŭ pri sia fako. Nuraj kaj puraj terminologoj, kiuj revas pri dikaj vortaroj logantaj movaden la fakulojn, estas malofta specio.

Krome, kiu ajn "simpla" esp-o povas ekbezoni fakan vorton, ĉar li verkas artikolon por *Monato*, ĉar li kuiras laŭ internacia receptaro, ĉar lia korespondanto petas specialan medikamenton, ĉar li devas interpreti en biciklofabriko... (al mi ĉi-lastaj okazis).

Kiam mi demandis la konatan interlingviston kaj psikiatron Tazion Carlevaron pri lia uzo de la nekutimaj terminoj *refuli*, *imaginara kaj geŝtalo*, li respondis: "ekzistas necerteco en la uzo de fakvortoj psikologiaj en esperanto, samkiel ekzistas io tia en ties uzo en la romanĉa kaj indonezia. Ĉar ne sufiĉas ke ekzistas vortaro. La vera lingvo-uzo establiĝas per faka verkado". Simile, Gudskov mem konstata en sia "La infana etno" (*Esperanto*, majo 1993): "Ĉiu lingvo estas tia kiu an bezonas la uzantojn... se iu parto de la popolo maturiĝas por akcepti iom novkarakteran lingvaĵon, ĝi akceptos kaj uzos ĝin". Esperantujo jam bezonas, akceptas kaj uzas fakvortojn.

István Ertl, Nederlando

### Ege fatala eraro

Leginte la artikolon de M. Cwik "Kiel diplomatece propagandi?" (*Eventoj*, 2/septembro), mi deziras diri, ke mi tute aprobas la konceptojn de nia tre certe kompetenta samideano, krom unu punkto: mi absolute kontraŭas la ideon paroli pri aliaj "planitaj lingvoj", kiel interlingua, novial, glossa ktp.

Mi memoras ke prof. Lapenna konstante diris kaj skribis, ke tio estas *ege fatala eraro*.

Ni bone scias ke - fakte - nur esperanto estas reale funkcia planlingvo, kun relative multaj praktikantoj, literaturo, kongresoj ktp. Ni neniam devas konfuzi la ideojn de niaj kunparolantoj kaj, vere stulte, mem doni al tiuj multegaj projektoj surpaperaj la gravecon, kiun ili tute ne havas, sub la maljusta preteksto de senpartieco!

A. Frangeul, Francio

## I L E I

### Monda kongreso de lingvo-instruistoj en Hamburg

La "18th World Congress of the Fédération Internationale de Professeurs de Langues Vivantes (FIPLL)" (18-a Kongreso de la internacia federacio de instruistoj de vivantaj [modernaj] lingvoj) okazos de la 28-a de marto ĝis 1-a de aprilo 1994 en Hamburgo (kongrescentro). Ligita al la kongreso estas konferenco de la germana "Fachverband Moderne Fremdsprachen" (IMF, faka asocio de instruistoj por modernaj fremdlingvoj) kaj ekspozicio de lerniloj.

Hamburga grupo pretas fari surlokajn organizajn laborojn por helpi la eventualan fakan partoprenon flanke de kompetentaj instruistoj. Aparte, kompreneble, temas pri vere kompetenta faka partopreno en la ambaŭ gravaj aranĝoj. Pri la faka komponento okupiĝas d-ro Till Dahlenburg (D-19412 BrühlFeldstr. 13). Pro aliaj aspektoj de eventuala partopreno aŭ kunagado skribu al:

d-ro Werner Bormann, Schürstr. 26,  
D-21031 Hamburg, Germanio  
el "Informilo por interlingvistoj" 2/1993

### 25 abiturientiĝintoj!

En la "Eksperimenta Mezlernejo Endre Ady" en Sarkad, suda Hungario, antaŭ kvin jaroj komenciĝis la instruado de esperanto, komence kiel fakrondo, nune jam kiel elekta fremda lingvo.

Pasintjare 25 gelernantoj abiturientiĝis pri esperanto, kaj ĉi-jare lernas ĝin 17 gelernantoj, kiel elekta (sed tiam deviga) studobjekto.

Instruisto Georgo Flender kaj la lernantoj volonte plilarĝigus iliajn internaciajn kontaktojn. Skribu al:

Mezlernejo Endre Ady,  
György Flender,  
Vasút u. 2, H-5720 Sarkad, Hungario.

## Alvoko!

### HOMARANOJ,

registru senkoste vian adreson en Tutmonda Homaranista Adresaro!

Zamenhof skribis: "Lingvo internacia havas la celon krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato lingva, la homaranismo volas krei tian saman ponton en ĉiuj rilatoj. La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo, kaj ĉiuj tion ĉi sentas, kvankam ne ĉiuj volas tion ĉi laŭte diri".

Info-servo celas ebligi kontaktojn inter ĉiuj, kiuj interesiĝas pri homaranismo. Tial ni preparas Tutmondan Homaranisman Adresaron. Se vi deziras registri vian adreson en tiu ĉi adresaro, bv. sciigi vian adreson al:

Info-Servo, Bismarkstr. 28,  
D-35037 Marburg, Germanio.

## Opinioj

### Ĉu relanĉi Moresneton?

Reage al la artikolo en *Eventoj* (2/aŭgusto) de A. Ananjin mi volas doni kelkajn pliajn informojn pri la iama ŝtato esperantista en Moresneto laŭ artikolo en bulteno *Hejmoj* (n-ro 2, aprilo 1993).

Post la malvenko de Napoleono naskiĝis dum Viena Kongreso en 1815 malgranda neŭtrala teritorio inter Nederlando kaj Germanio. Ĝia areo estis nur 3,44 km<sup>2</sup>, sed ties loĝantoj, pro la praktike memstara ŝtato, fariĝis tiom memkonsciaj, ke ili per publika peticio evitis disigon de la teritorio en 1897.

En 1906 franca esperantisto kaj la dua urbestro decidis provi krei sendependan ŝtaton sub la nomo *Amikejo*. La plano estis, ke amikejo iĝu komerca centro per vasta uzado de esperanto. Kiel s-ro Ananjin skribas, la internacia lingvo estis amase instruita. Eĉ oni havis aprobon de Zamenhof. La 13-an de aŭgusto 1908 la ŝtato fondiĝis oficiale.

Dum la 4-a UK en Drezdeno estis plimalpli decidita la translokiĝo de la internacia esperanto-oficejo de Ĝenevo al Amikejo. Sed baldaŭ eksplodis la unua mondmilito kaj la ŝtaton la 4-an de aŭgusto 1914 invadis prusaj trupoj. En 1918 la ŝtato per traktado de Versailles estis atribuita al Belgio. Do, efektive la ŝtato Amikejo estis malkreita perforte de militistoj!

Mi havas la saman opinion kiel s-ro Ananjin pri la neŭtraleco de esperanto. Nepre neniu ŝtato igu la lingvon esperanto la gepatra lingvo de siaj loĝantoj. Sed en Moresneto/Amikejo ja oni ne volis forigi la gepatran lingvon de la homoj, sed uzi esperanton en internacia komercado. Tio, laŭ mi, ne tuŝas la neŭtralecon de esperanto, sed donus pli vastan bazon kaj rimedojn al la movado.

En ĉiu kazo la loĝantoj de Kelmis (kiel Moresneto nomiĝas hodiaŭ) havas la rajtojn je propra ŝtato, estu ĝi esperantista aŭ ne. Fakte, dum la hodiaŭaj kvereloj inter belgaj anoj de diversaj lingvogrupoj ekestis nova situacio por la urbo. En eventuala disfalo de Belgio la urbo ja povus esti nek parto de Valonio, nek de Flandrio, ĉar ĝi estas germanlingva. Sed tio estas tute alia historio...

S. G. Ralf Fröhlich, Danio

### La unua esperantista geedza paro

En *Eventoj* n-ro 39 mi legis la artikolon de Bernard Golden "La unua internacia esperantista geedziĝo". Li skribas, i.a.: "Mi ankoraŭ ne sukcesis malkovri donitaĵojn pri la unua geedziĝo inter samnaciaj esperantistoj".

Nu, miaopinie, eĉ se tio fakte estas malfermi nefermitan pordon, tiu honoro apartenas al la paro Zamenhof!

Ja, la 26-a de julio 1887 estas la naskiĝdato de la plej unua lernolibro de Doktoro Esperanto, eldonita dank' al doto, ricevita de Klara Silbernik. L. L. Zamenhof kaj Klara Silbernik geedziĝis la 9-an de aŭgusto 1887.

Jean Amouroux, Francio

## Revuoj, gazetoj

### Por esperanto en Eŭropo

La *Eŭropa Esperantisto* estas la kvaronjara revuo de la Eŭropa Esperanto-Forumo, kiu kreiĝis antaŭ du jaroj. La celo de la organizo estas kunligi la esperanto-movadon kun la eŭropa movado.

La gazeto eldoniĝas kvarfoje jare, kaj kostas 2

GBP (aŭ 4 IRK) jare - por eŭropanoj. Por ekstereŭropanoj ĝi aboneblas kontraŭ 6 GBP (6 IRK). Ĝi enhavas informojn kaj artikolojn pri Eŭropo, la Eŭropa Komunumo, la lingva situacio en Eŭropo kaj esperanto; la numeroj kutime havas 8 paĝojn A5. Redaktas la gazeton Edmund Grimley Evans. La gazeto aboneblas laŭ la adreso:

La Eŭropa Esperantisto, First Floor Flat, 27 Montpellier Str., Brighton, BN1 3DL, Britio.



## Hungara angulo

### Literatura kunveno

Esperanta PEN-Centro la 21-an de novembro je la 17<sup>30</sup> en *Esperejo* organizas literaturan kunvenon kun la temo: "La esperanta literaturo antaŭ la jaro 2000". Prelegas d-ro Vilmos Benczik.

Estiĝintaj jam tradiciaj, la aranĝoj de la Esperanta PEN-Centro (ĉiun trian dimanĉon de monato) estas karakterizataj de alta nivelo de la prelegoj kaj viglaj diskutoj pri la problemoj de la e-kulturo. Esperantistoj ne hezitu partopreni ilin!

### Esperantaj mesoj

Ĉiun unuan dimanĉon de la monato je la 14<sup>30</sup> okazas esperantlingvaj mesoj en la katedrala preĝejo sur placo Mikszáth Kálmán, Budapeŝt VIII.

### Tutlanda Esperanto-Deklamkonkurso

Ĝi okazos 09. - 11.04.1994 en Pápa laŭ 4 kategorioj: 6 - 10-jaruloj; 10 - 14-jaruloj; mezlernejanaj, plenkreskuloj. Ĉiu prezentu *unu verkon libere elektitan*. Pli detalajn informojn oni ricevu ĉe:

8500 Pápa, Anna tér 1; tel. +89-324896

### Estrarkunsido de HEA

Ĝi okazos la 13-an de novembro je la 10-a horo en la centra oficejo (Andrássy ut. 27). En la tagordo du ĉefaj demandoj:

- la taskoj de la centra oficejo en la novaj cirkonstancoj;
- farendaĵoj laŭ la nova organiza kaj funkcia regularo de HEA.

Oszkár Princz

## Konkurso

### Rezultoj de la belartaj konkurso de UEAJ

#### Poezio:

- 1a premio: Georgo Kamačo (Hispanio) pro *Monologo kun Mediteraneo*.
- 2a premio: Miguel Fernández (Hispanio) pro *lama am' aŭ sonĝo ĉiunoktas*.
- 3a premio: Goncalo Neves (Portugalia) pro *Metropulo*.
- Honora mencio: Goncalo Neves pro *Lavistino fonta* kaj Miguel Fernández pro *Poeto*. Partoprenis 57 verkoj de 20 aŭtoroj el 19 landoj.

#### Prozo:

- 1a premio: Miguel Fernández (Hispanio) pro *Ek al barikadoj!*
- 2a premio: Liven Dek (Hispanio) pro *Semo*.
- 3a premio: Goncalo Neves (Portugalia) pro *Jozefo*.
- Honora mencio: Miguel Fernández pro *Esercen persense*. Partoprenis 25 verkoj de 13 aŭtoroj el 10 landoj.

#### Teatraĵo:

- 1a premio: ne aljuĝita.
- 2a premio: Sten Johansson (svedio) pro *Savboato*.
- 3a premio: Stefan MacGill (Hungario) pro *Konvena rezulto*.
- Honora mencio: Abel Montagut (Katalunio) pro *Don Kihoto eksterlande* kaj Sten Johansson (Svedio) pro *Heliko - aŭ podia diskuto pri la lingva evoluo de esperanto*. Partoprenis 4 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

#### Eseo:

- Premio Luiĝi Minnaja: ne aljuĝita.
- Honora mencio: Waldek Pastuszka (Polio) pro *Problemoj kaj eblecoj de ŝaradtaska kreado en esperanta lingvo*. Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 3 landoj.


**Premio An-okin pri kanto:** Flávio Fonseca (Brazilio) pro *Babelturo* kaj Miguel Fernández, teksto, kaj Pedro Vilarroig, muziko (Hispanio) pro la kantoj *Antemo* kaj *Tarde*.

Partoprenis 9 kantoj de 5 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 5 landoj.

**Premio nova talento:** ne aljuĝita.

**Premio infanlibro de la jaro 1992:** *Tiel do. Rakontoj por malgrandaj infanoj* de Rudyard Kipling; tradukita el la angla de Wouter F. Pilger. Eldonita de Vulpo-Libro, Lelstad (Nederlando).

Partoprenis 2 libroj de 2 eldonejoj de 2 landoj.



...Via helpo pri e-literaro por komputiloj estas bonega ideo, jam de longe ĝenis min la manko de perkomputilaj esperantoliteroj specialaj...

Mi aldonas mian gratulon kaj admiron pri la gazeto. Mi taksas ĝin eble la plej mulfaceta gazeto en nia movado, certe unu el la plej viglaj kaj elantaj...

Walter Ruck, Aŭstrio

## Historio

### Pri la familio Kóvary

#### Kontribuaĵo al la historio de esperanta denaskismo

En la numero 100 de "Literatura Foiro" (decembro 1986) estas artikolo de Jaroslav Marík *La unua agnoskita esperantlingvano*. Ĝi rakontas pri vizito al e-klubo en Praga de oficiro de usona armeo, esperantisto, nomata Kóvary. Liaj gepatroj, estante malsamnaciaj, uzis e-on kiel la hejman lingvon, kaj, sekve de tio, iliaj infanoj edukiĝis kiel denaskaj parolantoj de tiu lingvo. Kiam estis necese en la jaroj 1922-28 enskribi la gepatran lingvon en lerneja dokumento de tiu s-ro Kóvary, liaj gepatroj insistis, ke ĝi estu esperanto. Laŭ Marík, tio estis la "unusola kazo", kiam e-o estis oficiale agnoskita kiel gepatra lingvo. La patro de la familio nomiĝis Julio. Poste, pro la okupado de Ĉeĥoslovakio fare de la nazioj, la familio Kóvary transloĝiĝis al Nov-Jorko. Pli detalaj informoj en la artikolo mankas.

Kvankam mi esperantistiĝis en Nov-Jorko, mi neniam renkontiĝis kun s-ro Kóvary. Sed en la libro de F. A. Postnikov "Kiu estas kiu inter nord-amerikaj esperantistoj" (2-a eld. -1947-48) mi trovis informojn, kompletigantajn la artikolon de Marík.

En 1947 Olivio (ne Julio!) Kovary (ĉ en Usono iĝis o) loĝis en Nov-Jorko. Li naskiĝis en 1890 kaj loĝis en Bratislavo. Kvankam ne estis eksplicite dirite, ke li estis hungaro, la familia nomo atestas tion. Laŭ profesie li estis peltisto. Li komencis lerni e-on en 1900, kiam li havis 10 jarojn, kaj frekventis klason, kies instruistino senpage donis lecionojn pri e-o al infanoj, kiuj deziris lerni la lingvon.

En 1918 s-ro Kóvary edziĝis al virino, kiu plej probable estis slovakino, kaj li esperantistiĝis ŝin. Ŝi lernis la lingvon en tri monatoj; poste la gepatroj parolis esperante al siaj infanoj ekde ties naskiĝo. La familio ĉeestis UK-on en Vieno en 1924 kaj poste plurajn aliajn. Dum tiuj aranĝaĵoj ili sukcese uzis siajn infanojn por propagando de esperanto.

Tamen la citita fonto ne mencias nomojn

de la infanoj, kiuj denaske parolis esperante. Mi provis spuri ilin aliloke. En malnovaj *Jarlibroj* de UEA mi trovis jenajn informojn pri Olivio Kovary (denove o anst. ĉ!) kaj liaj du filoj.

La patro naskiĝis en 1890 kaj esperantistiĝis en 1899 (unu jaron pli frue ol laŭ unua fonto). Li havis honoron esti nomata pioniro, formala titolo aplikebla al tiu, kiu esperantistiĝis en la pasinta jarcento. Pro tio lia nomo aperis en la listo de vivantaj pioniroj, kompilita de Veterana Esperantista Klubo kaj publikigita ĉiujare en la *Jarlibro*. La lastan fojon lia nomo aperas en 1973; plej verŝajne li mortis en 1973 aŭ 1974.

Alia rubriko, kiu aperis en la *Jarlibroj* en 1960-aj jaroj, listigis denaskajn esperantistojn. En la *Jarlibro* por 1966 aperis la unuan fojon la nomoj de du filoj de Olivio Kóvary: Ernest, kiu naskiĝis la 2-an de aprilo 1919 kaj loĝis en Nov-jorko; kaj Tom, kiu naskiĝis la 23-an de junio 1920 kaj loĝis en Ithaca (ŝtato Nov-Jorko, Usono).

Mi ankoraŭ ne sukcesis klarigi ĉiujn aspektojn de la historio de la familio. Kiel aperis la nomo "Julio" anstataŭ "Olivio" en artikolo de Marík? Kiu el la filoj estis la usona armea oficiro, kiu vizitis la pragan e-klubon en 1945?

Nun venas la plej tiklaj demandoj el ĉiuj. Kio okazis al la du denaske parolantaj esperantistoj, kiuj estis "ekspoziciataj" de la gepatroj ĉe UK-oj? Kiel povis okazi, ke la emovado perdis ilin? Aŭ ĉu ili perdis la movadon? Por kiu celo estas la hejma uzo de e-o, se ĝi ne preparas infanojn por partopreno en la vivo de e-komunumo ekster la limigita rondo de la familio? Ĉu denaska esperantisteco estas travivaĵo simila al iu infana malsano, kiun kelkaj infanoj suferas dum relative mallonga periodo, sed kiun ili ĉiam sukcesas superi? Mi estas tre scivola pri la adoleska kaj adolta vivhistorio de la infanoj, kiuj tre frue verdiĝis. Kiom da ili en postaj jaroj perdis sian koloron kaj eĉ fariĝis malesperantistoj? Jen temo por sociologia esploro.

Kaj fine: ĉu vere, ke la filoj de O. Kóvary estis "la unusola kazo", kiam esperanto estis oficiale agnoskita, kiel gepatra lingvo?

Bernard Golden

## Organizaj demandoj

### UN-Asembleo en esperanto

"Ĉu vere?.." - kun timema espero povas demandi la leganto, ekvidinte la artikoltitolon. Li trankviliĝu tuj - ankoraŭ ne. Temas nur pri rolludo, kiun planas okazigi dum UK en Tampere (1995, jaro de la kvindekjara jubileo de UN) Geoffrey Greatrex el Britio. Temas pri "modelo" de la Ĝenerala Asembleo (ĜA); la partoprenantoj reprezentos sian landon, kvazaŭ ili estos en la vera ĜA. Ĉi tiun planon oni elpensis unuavice por montri la

fortecon de nia lingvo - ke ĝi kapablas facile kaj efike trakti temojn, kiajn traktas vera ĜA. Alia flanko de la afero estas, ke tiaj "modeloj" estas ĝuindaj kaj interesaj por la partoprenantoj, kiuj havis la okazon debati gravajn temojn kaj profundigi sian komprenon de la internacia politiko.

Se vi volas mem partopreni la ludon, aŭ konas taŭgan personon, kiu povas plej bone ĝin partopreni, informu la organizanton (li ankaŭ provizos vin per necesaj klarigoj):

Geoffrey Greatrex, Exeter College,  
Oxford OX1 3DP, Britio;  
elektronika poŝto: greatrex@exeter.oxford.ac.uk

## Korespondi deziras

Esperantista usonano serĉas gekorespondantojn pri lingvistikaj aferoj, precipe leksikografio (t.e., vortaristaj aferoj):

*S-ro Mihael Larkin, 3904 Beadle Lake Drive, Battle Creek, Michigan 49017, USA.*

...

Grupo de komencantoj (12 personoj de 35 ĝis 65 jaroj) serĉas korespondkontaktojn:

*Esperanto, M.J.C., Place de Verdun, F-49400 Saumur, Francio.*

...

Kursgvidanto volas trovi korespondamikojn por siaj lernantinoj (averaĝe 55-jaraj):

*Daniel Durand, Les Nids, F-49190 Saint Aubin de Luigne, Francio.*

...

23-jara studento de biologio pri ĉiuj temoj:

*Rafal Tuszyński, str. Koszyńców Kościuszkowskich 12, A, 13, PL 87-100 Toruń, Polio.*

...

36-jara polo, interesiĝas pri komputiko, naturo, vojaĝoj, baletto, junulara muziko, fotografio, sekso, serĉas geamikojn ĝis 36-jarajn:

*Gregorz Hienc, Poprzeczna 14 c/13, PL-62-005 Owinska, Polio.*

## Anoncetoj

Nepala E-Asocio, kaj ĝia bulteno: "Montejo" havas novan adreson: *P.O. Box 6304, Kathmandu, Nepal.* Ĉiaspecaj kontaktoj estas bonvenaj.

\*\*\*

E-klubo "Brilanta Stelo" (la plej aktiva en Niĝerio) deziras ĝemeliĝi kun alilandaj kluboj. Cetero, de la 26-a ĝis 29-a de novembro la klubo organizas partoprenon de esperantistoj en la 4-a *Tutima Kultura Festivalo "Ozueuimo '93"*, post kio okazos rondvojaĝo en norda Niĝerio kaj semajna restado en Benino. Interesiĝantoj tuj Kontaktuj! La adreso de la klubo:

*P.O. Box 99, Owevri-Imostate, Niĝerio.*

\*\*\*

Adresaron de firmaoj, uzantaj esperanton el eks-Sovetio kompilas Mihail Ĉertilov:

*"Esperanto-Inform", pk.111, Moskovskaja obl., Odincovo-6, RUS-143000, Rusio.*

\*\*\*

Skorpio (naskiĝinta la 30-an de oktobro 1967), 1,6 m alta, maldika kaj latinaspakta deziras konatiĝi kun esperantistino, naskiĝinta je la 2h30m la 30-an de aprilo 1971 en Ĉeĥio, Slovakio, Luksemburgio, Svisio, Islando aŭ eŭropa parto de eks-Sovetio.

*Otávis das Almas, Paraíba de Sul-RJ, BR-25850-000, Brazilio.*

EVENTOJ, Njt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:

H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.

Megjelenik kéthetente. Kézbesíti az MPV-HPI.

Készült a SZELKER Bt. nyomdában:

H-1161 Budapest, Baross u. 114.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.

Eldonas LINGVO-Studio kaj Kultura Esperanto-Asocio.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.

La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondas pri la anonc-enhavo.

Represo de artikoloj estas permesita, kun indiko de la fontoj.

## Ĉu EVENTOJ estas la relative plej malmultekosta?

Nomo de la gazeto	Kiomfoje aperas jare	Simpla abonkotizo por 1994.	proporcio prezo de 1 numero	neta (sen poŝtelspezoj) abonkotizo	proporcio neta prezo de 1 numero
Eventoj	24	65 nlg	2,70	41	1,71
Esperanto	11	58 nlg	5,27	47	4,27
Kontakto	6	29 nlg	4,83	23	3,83
Heroldo	16	50 nlg	3,12	34	2,13
Monato	12	69 nlg	5,75	57	4,75
Sennaciulo	11	44,5 nlg	4,05	33,5	3,05
Tejo Tutmonde	4	15 nlg	3,75	11	2,75

Por taksu la abonprezon eble estas interese studi la supran tabelon. Kiel abonkotizo (por kompareblo) estis konsiderata la nederlanda kotizo. Ju pli ofte aperas iu gazeto, des pli kostas la poŝta afrankado, do ni kalkulis ankaŭ la netan (=sendokostan) kotizon. Kiel sendokosto, estas subtrahita po 1 NLG por sendo de 1 numero, kio pli-malpli validas en ĉiuj koncernaj landoj.

## Mallonge

### Norvega eldonejo - malfondita

Dum sia jarkunveno en Skjeberg en majo Norvega E-Ligo decidis malfondi sian Eldonejon ESPERANTO kiel akcia societo. La decido rilatas ĉefe al la formo de agado, do ĝi apenaŭ havos praktikajn sekvojn por la libroserva aŭ eldona agado.

*laŭ Norvega Esperantisto 4/1993.*

### Esperanto en "Satanaj versoj"


En la fama verko "Satanaj versoj" de Salman Ruŝdi aperas sur la paĝo 385 jena frazo: "Inter ĉiuj televidaj bildoj de la hibridaj tragedioj - senutileco de tritonoj, malsukcesoj de plasta kirurgio, stulteco de la grandparto de la nuntempa arto, tiom sengusta kiom Esperanto, freneza koloniigo de la planedo - oni ofertas tiun ĉi donacon. Sufiĉas. Li elŝaltis televidilon".

*el "Heroldo de Esperanto", 16.10.1993*

## INTERNACIA KONKURSO POR MEZLERNEJANOJ

### 2-a taskfolio

1. Mankas duono de kunmetitaj vortoj. Trovu la du komunajn elementojn:  
*...floto. ...dromo, ...kastelo / hor..., naĝo..., mam...* (2 poentoj)
2. Esprimu per unu vorto uzante afiks(oid)ojn!  
*homo el la sama urbo / ŝanĝi loĝejon / viro sen hejmo* (3 poentoj)
3. La tablo estas primetita por tagmanĝo. Skribu almenaŭ ses objektojn, kiujn vi vidas sur ĝi! (3 poentoj)
4. Vi tagmanĝas en kompanio. La kunuloj deziras al vi bonan apetiton. Kion vi rediras? (2 poentoj)
5. Kiuj tabelvortoj mankas en la proverbo? *Pli bone estas ... ol ...* (2 poentoj)
6. Kion signifas la mallongigoj: *n-ro, P.S., ĉ.?* (3 poentoj)
7. *Somere - en pelto, vintre - sen vesto.* Kio estas tio? (2 poentoj)
8. Solvu la krucvortenigmon, skribu la nomon kaj tion, kion vi scias pri ili! (3 poentoj)



### KRUCVORTENIGMO

Vi trovas strangajn malvortojn. Trovu iliajn sinonimojn, kiujn oni uzas anstataŭ ili.

1. malkun; 2. malplori; 3. malpreni; 4. malperdi; 5. malaĉeti; 6. malricevi; 7. malmalteno; 8. maltrovi; 9. malĉio; 10. malblindi; 11. mal-unua; 12. malviva

La solvojn sendu ĝis la 6-a de decembro 1993 al:

*Bányai Júlia Gimnázium, Esperanto-grupo, Nyíri út 11, H-6000 Kecskemét, Hungario*



## HELPU!

### Por verko pri esperanto en radio

Mi verkas libron pri esperantlingvaj radio-programoj. Sed mi havas malmultajn materialojn kaj bezonas helpon. Bv. sendi al mi materialojn pri la historio, programoj ktp. rilate al la temo "esperanto en radio" al la adreso:

*Marcelo Luis Brasil, Rua Professor Joao*

*Doetzer 33, jardim Santa Bárbara 81.*

*540-190 Curitiba-Paraná, Brasil*

## ATENTON!!!

### Abonkotizo por Eventoj en 1994:

- 65 nederlandaj guldenoj
- aerpoŝte: 76 guldenoj.

Speciala kotizo

por la orienteŭropaj landoj:

- 27 guldenoj (1250 forintoj).